Est. A-17204

# Interna regularo de EAE

(akceptita de ĝenerala kunveno de EAE la 2.IV.1934)

## I. Anoj (organizaĵoj, aliĝintaj al EAE)

1. La anaron de la Asocio konsistigas ĉiuj organizaĵoj, akirintaj la membrorajtojn sur la bazo de la statuto laŭ maniero, antaŭvidita en la interna regularo.

2. Memstara Esp. organizaĵo, deziranta aliĝi al EAE, prezentas al ĝia estraro konforman deziresprimon sur bazo de decido de sia ĝenerala kunveno, aldonante al ĝi kopion de sia laŭleĝe registrita statuto; Esp. fako ĉe neesperantista organizaĵo prezentas sur bazo de decido de ĝenerala kunveno de la fako pere de la organizaĵo kopion de sia interna regularo kaj kopion de la statuto de la laŭleĝe registrita organizaĵo, kies fako ĝi estas. La estraro de EAE decidas pri la akcepto de la aliĝo en la daŭro de unu monato post la tago de la ricevo de la deziresprimo.



i 53030758 TARTU ÜLIKOOLI RAAMATUKOGU

3. Samtempe kun la pago de la kotizo al EAE la aliĝinta organizaĵo prezentas al EAE la nomaron de la anoj, por kiuj ĝi pagas, notante en ĝi iliajn familian kaj antaŭnomon, adreson kaj laŭeble aĝon kaj profesion.

4. Ĉiu aliĝinta organizaĵo devas zorgi pri tio, ke la kotizo por ĝiaj jam aliĝintaj anoj estu pagita al EAE en la daŭro de tri monatoj post la jarkunveno; en mala okazo EAE ĉesas interrilati kun ĝi kiel kun sia ano ĝis la pago de la kotizo; se la kotizo ne estas pagita ĝis la fino de la kalendara jaro, la koncerna organizaĵo devas prezenti novan konforman deziresprimon al EAE, por refariĝi ĝia ano.

5. Ĉiu aliĝinta organizaĵo devas informi la estraron pri ŝanĝoj de sia statuto.

6. Novaj anoj ricevas parol- kaj voĉrajton nur post pago de la kotizo.

7. La aliĝintaj societoj informas la Asocion pri la ŝanĝoj de sia adreso kaj la ĉefaj decidoj de siaj ĝeneralaj kunvenoj kiel konsisto de la novaj estraro kaj revizia komisiono, ĉefaj atingaĵoj kaj intencoj k. a. La estraranoj de EAE rajtas ĉeesti kun parolrajto la ĝeneralajn kaj estrarajn kunvenojn de la societoj.

8. Se la agado de aliĝinta organizaĵo ne estas konforma al la statuto aŭ al la interna regularo de EAE, la estraro prezentas al la ĝenerala kunveno proponon

pri ĝia eksiĝo. Necesokaze la estraro povas ĝis la decido de la ĝenerala kunveno flankenigi ĝin de la agado de EAE.

9. Pri la limigo de la anorajtoj aŭ pri senigo de ili la estraro informas la koncernan anon en la daŭro de du semajnoj post tiurilata decido.

10. Se la estraro ne faras al la jarkunveno proponon pri eksigo de ano, aginta kontraŭ la statuto aŭ la interna regularo de EAE, tion rajtas fari la revizia komisiono. La propono pri eksigo devas esti skriba kaj motivita.

11. La eksigota organizaĵo rajtas defendi sin dum la ĝenerala kunveno de EAE per siaj reprezentantoj.

## II. Estraro de EAE

12. La estraro estas elektata konforme al la statuto.

13. Plej malfrue du semajnojn post la elekto de nova estraro la antaŭa prezidanto de EAE aŭ okaze de lia foresto ĝia vicprezidanto kunvokas transdonan kunvenon, kiun partoprenas la anoj de la malnova kaj nova estraroj.

Rimarko: Dum tiu kunveno la anoj de la malnova estraro havas nur parolrajton.

14. Se la malnova estraro malatentas la postulon, antaŭviditan en la antaŭa pa-

ragrafo, la transdonan kunvenon devas kunvoki en la daŭro de du semajnoj post tio la nova prezidanto de EAE.

15. Dum la unua kunveno la estraro dividas inter siaj anoj la oficojn, akceptas de la malnova estraro la afergvidadon kaj havaĵon laŭ nomaro kaj fiksas la tempon de la laŭvicaj estraraj kunvenoj; post ricevo de la protokolo pri la ĝenerala kunveno ĝi pridiskutas la efektivigeblecon de la agadplano, konsiderante la direktivojn, donitajn de la ĝenerala kunveno.

Rimarko: Pri la transdono oni faras akton, skribatan en la libron de protokoloj pri la estraraj kunvenoj kaj subskribatan de la malnova kaj nova estraroj.

16. Kunvenoj de la estraro de EAE okazas almenaŭ unufoje en monato, laŭeble dum certa semajntago. Se la kunveno ne povas okazi en la fiksita tago, la sekretario interkonsente kun la prezidanto kaj almenaŭ unu estrarano fiksan novan tagon, sciigante pri tio la aliajn.

17. La estrarajn kunvenojn povas partopreni kun parolrajto la anoj de la revizia komisiono kaj, laŭ konsento de la estraro, kandidatoj de la estraro kaj anoj de tiuj organizaĵoj, kiuj aliĝis al EAE.

18. La protokolon pri estrara kunveno subskribas ĉiuj partoprenintaj anoj de la estraro.

19. La decidoj de la estraro estas koncize aperigataj en „Informoj de EAE“. Ĉe konfirmo de la protokolo ĉiu estrarano rajtas postuli en la komenco de la kunveno, ke estu antaŭlegota la protokolo pri la pasinta kunveno, kiu postulo estas plenumenda.

20. La rajtigoj de la estraranoj finiĝas per transdono de la ofico al la nova estraro.

21. Se estrarano eksiĝas antaŭ la templimo aŭ se estrarano, loĝanta en Tallinn aŭ Nõmme, forestas trifoje laŭvice el la estrara kunveno sen konsiderinda kaŭzo, la estraro invitas anstataŭ li en la estraron la estraranan kandidaton, kiu ricevis plej multe da voĉoj. Post duafoja foresto al li estas sendata konforma averto.

R i m a r k o: La estraro decidas pri tio, ĉu la kaŭzo de la foresto estas konsiderinda aŭ ne.

22. La estraranoj de EAE havas la rajton ĉeesti la estrarajn kaj ĝeneralajn kunvenojn de ĉiuj organizaĵoj, aliĝintaj al ĝi, sed nur kun parolrajto.

## A. Prezidanto

23. La prezidanto gvidas la agadon de la Asocio konforme al ĝiaj principoj, reprezentas ĝin ekster ĝi kaj atentas pri tio, ke ĉiuj anoj de la estraro kaj de la Asocio plenumu siajn devojn.

24. La prezidanto gvidas la estrarajn kunvenojn kaj malfermas kaj gvidas la ĝeneralajn ĝis elekto de prezidanto de la kunveno.

25. La prezidanto preparas kun la sekretario la agadplanon de la sekvonta kaj la raporton pri la pasinta jaro, kaj kun la kasisto — la buĝeton kaj kasraporton kaj prezentas ilin al la estrara kunveno.

26. Ĉiuj leteroj de EAE, enhavantaj principajn demandojn, devas esti subskribitaj de la prezidanto. Li konfirmas per sia subskribo ankaŭ la elspezajn dokumentojn de la Asocio.

## B. Vicprezidanto

27. En okazoj, kiam la prezidanto estas malhelpita plenumi siajn devojn rilate al la Asocio, lin anstataŭas la vicprezidanto.

## C. Sekretario

28. La sekretario prizorgas la korespondadon de EAE kaj ĉe li troviĝas: la protokolaroj pri la estraraj kaj ĝeneralaj kunvenoj, la ricevitaj korespondaĵoj kaj la kopioj de la senditaj korespondaĵoj, la originala statuto kaj faritaj kontraktoj.

29. La sekretario preparas la tekston de la leteroj, subskribas kaj ekspedas ilin; li zorgas ankaŭ pri plenumo de § 26.

30. La sekretario protokolas la kunvenojn de la estraro.

31. Interkonsente kun la prezidanto la sekretario konsistigas la tagordon de la estraraj kunvenoj kaj kunvokas la eksterordinarajn estrarajn kunvenojn (v. § 16).

32. La sekretario komunikas la decidojn de la estraraj kunvenoj al ĉiuj koncernitoj.

33. La sekretario konsistigas kun la prezidanto la agadplanon kaj jarraporton de EAE laŭ la materialoj, disponigitaj de la aliaj estraranoj pri la fakoj, gvidataj de ili.

34. La stampilo de EAE estas ĉe la sekretario, se la estraro ne faras alian decidon tiurilate.

## Ĉ. Vicsekretario

35. La vicsekretario helpas la sekretarion ĉe la plenumado de liaj taskoj kaj anstataŭas lin en okazoj de neceso.

36. La vicsekretario zorgas pri la nomaro de la anoj de EAE kaj pri kolektado de priesperantaj artikoloj kaj notoj en la enlanda gazetaro.

## D. Kasisto

37. La kasisto aranĝas la ekonomian agadon de EAE. Ĉe li estas la kaso kaj la librotenado. La kasisto tenas la kas- kaj ĉeflibrojn kaj la libron pri movebla havaĵo,



TARTU ÜLIKOOLI
RAAMATUKOGU

akceptas resp. pagas laŭ kvitancoj resp. fakturoj monsumojn konforme al la decidoj de la estraraj kaj ĝeneralaj kunvenoj kaj subskribas kune kun la prezidanto la monajn dokumentojn de EAE.

38. La kasisto prezentas al estrara kunveno almenaŭ dufoje jare raporton pri la stato de la kaso de EAE.

39. La kasisto iniciatas en la estraro la demandon pri perdo de anorajtoj de tiuj anoj, kiuj ne repagis la kotizon.

40. La kasisto konsistigas kun la prezidanto laŭ materialoj, ricevitaj de la aliaj estraranoj, ĉiujare antaŭ la ordinara ĝenerala kunveno la kasraporton pri la pasinta kaj la buĝeton por la sekvonta jaro.

41. En okazo de neceso la estraro povas rajtigi iun alian estraranon plenumi dum certa tempo la taskojn de la kasisto.

## E. Fakestroj

42. Estas bezone havi ĉe EAE fakestrojn pri propagando, gazetaro, radio, muziko k. a.; la estraro elektas konvenajn personojn por plenumo de tiuj taskoj el siaj anoj aŭ ekster la estraro.

---

„Kiirtrükk" Tallinn, Rüütli 4. 1934.